4-a Jaro. N-o 165 APERAS  SEMAJNE 1. Decembro 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

KVAR MILIONOJ DA SKLAVOJ EN AFRIKO

Ŝajnas, ke la ĝenerala publiko ne scias, ke la sklaveco fakte ankoraŭ ekzistas kaj tute ne estas likvidita. Iuj paragrafoj troviĝas en kodoj de kelkaj ŝtatoj, sed la sklav-komerco daŭras. Kaj ĝi daŭros tiom longe, ĝis kiam fine ĉiuj kultur-popoloj ne interkonsentos internacie pri forigo de tia barbarismo.

La Ligo de Nacioj prilaboradis jam la problemon antaŭ kelka tempo, sed ĝi alvenis al neniu praktika decido.

Kaj intertempe kvar milionoj da sklavoj troviĝas en Afriko! Kvar milionoj da vivantaj kadavroj! En Suda Maroko, Tripolio kaj kelkaj ĉe-saharaj regionoj floras ankoraŭ nun vigla sklav-komerco! Virinoj kaj infanoj estas aŭkcie vendataj sur foiroj. Neniu granda ŝtato protestas kontraŭ tiu ĉi barbarismo. La afrikaj estroj, kiuj ne unufoje turnas sin al la tro indulgema Ligo de Nacioj postulante helpon, rifuzas tamen likvidi siajn haremojn. Ili plue venigas freŝan "varon" el la afrikaj sklav-foiroj. — Ne malofte okazas rab-atakoj en la malproksime troviĝantajn vilaĝojn. La vira loĝantaro estas mortpafata, la virinoj kaj la infanoj forkondukataj. Ili devas elporti la brutecon kaj la perforton de la rabistoj. Ankoraŭ sur la sklav-foiro okazas emociaj tragedioj. Kiel kameloj aŭ muloj ili estas vendaĉataj. La speciale belaj korpoj atingas fantaziajn prezojn. Ju pli hela la vizaĝ-koloro despli alta la prezo de sklavino.

La nevendita "varo" estas pelata de foiro al foiro ĝis ĝi fine aŭ vendiĝas aŭ pereas pro foruzo de tiuj fortoj. Memmortigoj kaj frenezigoj apartenas en tiuj transportoj — kiel konantoj de tieaj cirkonstancoj certigas — al ĉiutagaĵoj.

Arabio, en kiu ĉiumonate miloj da junaj knabinoj prenas devigate sur sin la malfacilan sorton de la sklaveco, estas ŝatata kiel tre taŭga kampo por la praktiko de ĉi tiu fripona metio. La rabistaj bandoj, kiuj okupiĝas pri kaptado de sklavinoj estas tre bone organizitaj. Ili havas specialan avertistan servon, kiu multe helpas al ili. La transportoj okazas en formo de simplaj pilgrim-transportoj. Ofte la sklav-komercistoj miksas sin kaj sian vivantan varon inter verajn pilgrimantajn kredulojn kaj ŝirmas sin tiamaniere kontraŭ la brako de la justeco.

Sufiĉe! Regas en tiuj regionoj barbarismo kiu devas esti forigita. Ne helpos belaj paroladoj dum komitat-kunsidoj de Ligo de Nacioj. Per tio ne estas forigebla la malbono.

La kontraŭsklaveca movado estis iniciatita — kiel oni scias — de kelkaj anglo-amerikaj filantropoj kaj ricevis fortan moralan kaj ekonomian subtenon en la nova mondo. La forigo de la sklaveco okazis pli rapide ol oni estis ĝenerale supozinta.

Ankaŭ en Eŭropo estiĝis la deziro fini kun tiu ĉi barbareco jam dum la Vien-a Kongreso en la jaro 1815. Ĝenerala deklaro de la kontraktantaj ŝtatoj jam tiam konsideris la sklav-komercon neakordebla kun la fundamentaj reguloj de l' homeco kaj publika moralo. La Quintupel-kontrakto de la 20. 12. 1841 inter Anglio, Aŭstrio, Prusio, Francio kaj Rusio donis al la partoprenintaj ŝtatoj la rajton kontroli la eventualajn malobeojn de la sklavkomerca malpermeso en la Atlantika oceano kaj starigi antaŭ juĝejo la iniciatintojn de tiaj krimoj. Ankaŭ la Kongo-akto de la jaro 1885 maturigis kelkajn kontraktojn pri la sklavkomerco precipe inter Azio kaj la orienta afrika bordo kaj Madagaskaro. La 2. 7. 1890 dum la Brusela konferenco la ŝtatoj forigis per ĝenerala akto la sklavecon kaj la sklavkomercon tiel sur maro kiel sur tero. Ĝi fariĝis valida de la 2. 4. 1892. Por forigi la malbonon oni fondis Internacian Mar-oficejon en Sansibar kaj Specialan Oficejon en Bruselo. Ĉio ĉi estis prepara laboro.

Kiel negativan rezulton ĝi donis, pruvas la fakto, ke kvar milionoj da sklavoj troviĝas ankoraŭ en Afriko.

Elgermanigis *Kurt Straube.*

K-doj, loĝantaj en tiuj landoj aŭ sciantaj detale pri la sklavkomerco sendu pli precizajn detalojn!

Trad.



Sanga teroro de la kristana registaro de Nederlando kontraŭ la revoluciuloj en Malajaj insuloj

La nederlanda registaro tute nediferencas de la sangosoifaj registaroj de Balkanŝtatoj, Italio, Hispanio ktp. La sanga persekutado kontraŭ ĉiuj, kiuj batalas kontraŭ subpremado kaj elprofitagado plimultiĝis tiel en Nederlando kiel en Malajaj insuloj. En ĉi lastaj okazis jam ribeloj kaj ili ankoraŭ okazos. La brunajn fratojn tedas jam la kristanaj flagoj kaj ili klopodas kiel siatempe la holandanoj mem, deĵeti la imperialistan jugon. Bedaŭrinde la registaro sukcesis sufoki la lastan ribelon per modernaj murdrimedoj. Miloj da herooj estis mortigitaj, miloj da ili forkondukitaj al la malariaj regionoj de Bovon-Digool, al tiu ĉi malproksima parto de Nova Gvineo, kie homoj mortas eĉ el melankolio pro izoleco ĉu pro la soifo al trinkaĵoj.

Sen iu ajn antaŭa esploro la sangestraro de Malajaj insuloj mortkondamnis krom tio sep K-dojn. Sep junaj, fortaj viroj, sep honestaj batalantoj por justeco kaj libereco estis ekzekutitaj antaŭ la malaja popolo, el kiu oni elsuĉas ĉiujare 100 milionojn da guldenoj.

Kaj la teroro ne ankoraŭ finiĝis. Oni kondamnas centojn al diversaj malliberejaj punoj variantaj inter 12 jaroj kaj ĝis morta puno.

Jen ekzemploj de la kristana regado: En *Sawaloento* la landa konsilantaro kondamnis 8 K-dojn po 20 j. kaj 12 po 12 j.! Tio estas entute 320 jaroj! Laŭ *"Aneta"* troviĝis la 30. aŭgusto 1927 1600 revoluciuloj en la malliberejoj de la okcidenta parto de la insulo Java.

La landkonsilantaro de *Solo* kondamnis pro mortigo de unu policisto, tri K-dojn al mortpuno, ses po 20 jaroj, dek po 15 jaroj kaj 20 po ok jaroj da malliberejo.

Tiu ĉi teroro okazas ne nur en la kolonioj sed ankaŭ en Nederlando mem.

La de en Leiden kaj Amsterdam arestitaj malajaj studentoj-Kamaradoj estas tre granda. Kun polic-hundoj oni traserĉadis la loĝejojn de niaj Kamaradoj. Ĉio kio estas uzebla oni forŝtelis. Tiel okazas en la "libera" Nederlando.

Laŭ "Aneta" denove kvar ekzekutoj okazis la 17. septembro 1927 en Pandeglag. La kondamnitoj estas: Jasa, Djamin, Hadji Asikin kaj Doelsalem.

La malliberigitaj estas: Mohamed Hatta, Ali Sastro Amidjojo, Raden Mas Abdoel Madjer Djodjojadininggrat kaj Nazir Pamontjak.

La ĵurnaloj: "De Moker", "De Wapens Neder", "De Branding", "Bevrijding", "De Arbeider", "De Vrije Socialist" kaj "Opstand" agitas kontraŭ tiu ĉi murd-praktikado. Multaj persekutoj okazis pro tio, sed niaj K-doj daŭrigas la batalon. *Laŭ la Informservo de AJI.*

PETROLO — REĜO DE L'MONDO

Militraporto pri la petrolfronto de Meksikio ĝis Mezopotamio

La petrolproduktado de Usono dum la lastaj semajnoj kreskiĝis *je 2 506 000 bareloj,* kontraŭ la antaŭa de 2 500 000. Sed la krud-oleoprezoj sur Mid Continent po barelo *altiĝis je 10 cendoj.* Kaj la benzin-prezoj en la okcidenta parto de Usono *plikariĝis pogalone je 4—6 cendoj.* La ĝenerala prezkariĝo laŭ *Wall Street Journal,* estas nur demando de kelkaj semajnoj kaj dependas de tio, kiam komencas la grandaj trustoj kompletigon de siaj provizaĵoj. La malkariĝo estis nur bezonata por ke *la trustoj malkare povu aĉeti* la malgrandajn kaj mezajn entreprenojn, kiuj ne povis suferi la deficitojn de l' *beso.*

Samtempe kun la altigo de l' prezoj, la petrolproduktantoj de Usono — *laŭ informo de Newyork Herald — redukti volas la petrolproduktadon.* Kvankam la ministro de l' justeco rifuzis provizore ĉi tiun projekton, kiun subtenis ankaŭ la ŝtatsekretario de internaj aferoj, la produktantoj ekmovigas ĉiujn ŝtonojn por efektivigi sian projekton.

Estas interese, ke samtempe, kiam la petrol-produktantoj de Usono penadas reduktigon de la produktado, inter la plej granda amerika petrolkompanio, la *Standard Oil Company* kaj la sovetia petrolsindikato fariĝis kontrakto, laŭ kiu *dum tri jaroj la Standard Oil ricevas jare 150 000 tunojn el la sovetia krudoleoproduktado.* Inverse Standard Oil *devigis sin al starigo de grandega petrolrafinejo en Batum* kaj al rafinigo *tie en Sovetio* la plimulton de l' 150 000 tunoj da petrolo. La petrolrafinejo konstruiĝos sur 84 000 kvadratfuta teritorio kaj 10 col-diametra tubkondukilo ligos ĝin kun la haveno. Laŭ la Konstantinopla korespondanto de l' *Frankfurter Zeitung,* la materialoj bezonataj por instaligo de petrolrafinejo jam alvenis el Novjorko. Do Standard Oil certigis sian hegemonion ankaŭ parte en Rusio. Sed la transiĝo de l' sovetia petrol-produktado en amerikan manon, absolute ne harmonias kun la fama letero de kolonelo *House,* (Hus) kion li direktis al la *Public Ledger* (Pöblik Lidzser) kaj en kiu, li asertis, ke *la paco de l' mondo dependas de tio, kiamaniere oni dividas inter unuopaj ŝtatoj la produktadon de petrolo kaj hejtmaterialo.* Sed ja ĉi tiu plinova amerika konkero eĉ pli malproporciigas la jam ĝisnun sufiĉe malproporcian dividon. Usono ja donas jam per siaj enlandaj fontoj grandan parton de l' tutmonda petrol-produktado. Sed la amerikanoj kutimas diri: "Petrolo estas la reĝo kaj ne la kotono". Kaj ĉi tio estas vera, ĉar la reĝo de Ameriko estas petrolo. Multaj milionoj da laboristoj estas subuloj de tiu ĉi reĝo kaj arego da spekulantoj ĝiaj korteganoj. Ĉion-enmaniriganta aktiveco regas en ĉi tiu industrio, *kiu celas subigon de ĉiuj aliaj industri-branĉoj.* —

En la porpetrolan luktadon inter Anglio kaj Ameriko, *Francio ne ankoraŭ intermiksiĝis.* Kial ne, tion respondas *prezidanto de l' porminej- kaj porpetrola komitato de la franca Ĉambro de deputitoj Charles Baron* (Ŝarl Baron) sur la kolonoj de granda pariza ĵurnalo.

— Pro la kulpo de niaj antaŭaj registaroj, — skribas la deputito — kiuj kredis, ke la petrolo estas sensignifa butikista varo kaj pro niaj parlamentoj, kiuj plimulton politikis ol estis bezone kaj tute ne volis okupiĝi pri nacia ekonomio kaj pro la miopeco de niaj kapitalistoj, Francio koncerne la estontan petrol-produktadon troviĝas en kriza situacio. Nek unu franca petrolfirmo faris seriozajn paŝojn por la enlanda petrolesplorado. Ili multe pli taksis la komfortan enpoŝigon de senriskaj monstraj profitoj (jare 600 milionoj da frankoj) ol ĉi tiujn necertajn entreprenojn. Eĉ unu el inter ili kaj eĉ la plej granda tute malkaŝe deklaris, ke *por ili la trovo de petrolfontoj en Francio signifus la plej grandan malbonŝancon.*

— Por plibone kompreni tiun ĉi klarigon — daŭrigas deputito Baron — ni devas scii, ke por la havigo de l'novaj petrolfontoj kvar gigantaj kompanioj bataladas: la *Standard Oil Company,* la *Royal Dutch-Shell* (Rojal Dütĉ-Ŝel), la *Anglo-Persian* kaj la *Sinclair* (Sinkler). Depost la Versalja (Versailles) paco la situacio tre malboniĝis inter la anglaj kaj amerikaj petroltrustoj. La angla *Royal Dutch* kaj la amerika *Standard Oil* senkompate luktadas unu kontraŭ la alia kaj ili uzas preskaŭ ĉiujn partojn de l' mondo por batalkampo. *En Meksikio rekomenciĝis la revolucioj kaj strikoj. En Georgio ili instigis kontraŭrevolucion. En Albanio ili provokis ribelon, por malhelpi kelkajn malpli signifajn petrolesploradojn.* En Mezopotamio ili kreis novajn ŝtatojn kaj akreditis novajn reĝojn. Ili ekscitigis Grekion kontraŭ Kemal Paŝa, ĉar la turka politikisto ne volis rezigni je la teritorioj, kies granda valoro ankaŭ por li ne estis sekreto. Ili atentis, ke Italio ne ekposedu Smirnion, ĉar tiun ĉi havenon projektis la angla petrolindustrio por orienta petrolhaveno de la Mediteranea maro. Kaj la mistika gvidanto de la trusto, la anglagreka sir *Bazil Zaharov* opiinis, ke la angla vazalo, Grekio, pliagrable servos interesojn de la trusto ol sendependa Italio de Mussolini. La subteno de l' rusaj kontraŭrevolucioj, poste la konfirmo de Sovetio estas same deduktebla je petrolkaŭzoj. Fine *Abd-el-Krim neniam estus ektrovinta la ideon por militadi kontraŭ Francio, se la angla trusto ne konjektus petrolon en la Riffa lando kaj se ĝi ne subtenus la araban ĉefulon.* La problemo pri libereco de l' markoloj, defendo de la kristanaj malplimultoj servas nur por kaŝi la luktadon de la du malamikaj kompanioj por la orientaj petrolfontoj. *Tio, kion oni komprenas sub orienta problemo, ne estas io alia ol nur la problemo de malgrandaziaj petrolfontoj.*

— *En la tuta mondo, grandskale altiĝas la konsumado de petrolo kaj benzino.* Posedo de l' petrolfontoj fariĝis en ĉiuj landoj de l' mondo la unuaranga faktoro en la ekonomia vivo. Granda potenco povas certigi liberecon de sia ekonomia vivo kaj defendon de siaj limoj — finas sian militalarmon la prezidanto de petrolkomisiono — nur se ĝi havas proprajn petrolfontojn. Ĉar la petrolo estas animo ne nur de la moderna industrio, sed ankaŭ de la moderna militado.

A. L.
"PEŜTI NAPLÓ"
Elhungarigis: Kolektivano.

Jen, kion kaŭzas la varmego!

Kelkaj homoj estas ĉiam frenezaj. Ĉiuj estas frenezaj. Iafoje ĉiuj samtempe estas frenezaj. Ĉi lasta fazo nun regas, do mi komencas disvolvi la kapturnajn problemojn, turmentantaj nuntempe la homaron.

La konferenco por senarmigo en Ĝenevo havis antaŭ si jenajn problemojn: 1. Kiel povus ĉiu partoprenanta potenco plimalgrandigi la mararmeon de aliaj ŝtatoj, ne reduktante sian propran. 2. Kiel estus eble garantii la liberecon de l' maroj, netuŝante la interesojn de la nunaj marregantoj. 3. Kiamaniere oni malebligu la atakojn per tio, ke oni aljuĝas al ĉiu potenco sufiĉan mararmeon por repuŝi: a) la mararmeon de sia ĉefa konkuranto; b) la mararmeon de siaj du ĉefaj konkurantoj; c) la unuigitan mararmeon de ĉiuj siaj konkurantoj. 4. Kiel malebligi la armigkonkuron, permesante al ĉiu nacio konstrui la plej grandan militŝiparon de l' mondo.

Ĉiujn ĉi problemojn de la Ĝeneva kunveno devis solvi tiuj admiraloj, vicadmiraloj kaj aliaj altrangaj oficiroj, kies laŭranga kaj laŭsalajra kariero dependas de la evoluo aŭ malevoluo de sia nacia marameo.

Se oni ekzemple reduktus la militŝiparon de Britio al unu krozŝipo, ties tuta personaro konsistus el oficiroj pli altrangaj ol admiralo kaj sur la estrado por ŝipestro la admiraloj formas amaskunvenon.

Laŭ sciigo de latina historiisto Bunkus Piffeleriu la katoj aranĝis en la jaro 27-a antaŭ Kristo sur la insulo Korfu kongreson, similan al la konferenco de Ĝenevo.

Ni ekscias, ke la katoj de Korfu forte konkuris por la tieaj musoj kaj pro la troakreco de la kataj dentoj kaj ungoj la pliakriĝinta lukto minacas plenan ekstermon al la musoj.

Post kelkmonataj disputoj ili decidis aĉeti raspilojn por malakrigi la dentojn kaj ungojn de katetoj. Por akiri la konsenton de ĉi lastaj, apogantoj de la decido (hazarde ĝuste la plej fortaj katoj) entreprenis mem la prizorgon de raspiloj kaj kontroladon de l' malakrigo.

Post kio la konferenco disiĝis dum ega miaŭado de la katetoj.

* * *

La Amerika farmisto havas antaŭ si jenajn problemojn: 1. Kiel teni kaj eĉ plialtigi la valoron de terposedaĵoj reduktante la impostojn kaj rentumojn difinitajn laŭ valoro de l' bienoj. 2. Kiel pligrandigi la konsumadon de fojno, hordeo kaj aveno, per pliigita apliko de agrikulturaj traktoroj, motoroj kaj aliaj benzinkonsumantaj iloj kaj veturiloj. 3. Kiel malkreskigi la ŝuldojn per plifaciligo de kreditkondiĉoj. 4. Kiel plialtigi la mondmerkatan prezon de agrikulturaj produktaĵoj helpe de importdoganoj. 5. Kiel reteni la infanojn ĉe l' agrikulturado, kiam la gepatroj devas migri en la urbon. 6. Kiel trovi novajn argumentojn por la politiko, de kiu ili rifuĝas.

La problemoj de la karbminej-posedantoj estas tro malmultaj kaj facilaj kaj ne bezonas profundan kuracadon. Mallonge, jenaj estas: 1. Kiel redukti la ĉiaman superproduktadon de karbo helpe de pli taŭgaj ekspluat-metodoj kaj perfektigitaj maŝinoj. 2. Kiel kreskigi la karbkonsumadon de l' industrio kaj transporto, reduktante la salajron kaj aĉetpovon de l' ministoj kaj aliaj laboristoj. 3. Kiel redukti la vendprezon de karbo per konstanta malaltigo de l' salajroj, ĝis la karbo estu, tiel malkara kiel la aero; pro tio la konsumantoj hejtos siajn fornojn eĉ dum julio kaj aŭgusto, samkiel oni enspiras pli da aero ol necesas, simple ĉar ĝi estas tiel malkara. 4. Plej lasta kaj plej simpla problemo estos tiu, de kie la minejposedantoj pruntericevos monon por pagi la rentumojn kaj dividendojn en tiu perfekta industribranĉo, kies produktaĵojn oni disdonas senpage.

* * *

La problemo de l' aŭtomobilfabrikado estas jena: Kiel altigi la prezojn de l' uzitaj aŭtomobiloj ĝis la limo, ke oni povu aĉeti novan por la sama sumo, sed tamen restu sufiĉe da profito por monsubteni tiujn, kiuj aĉetas por poparta pago uzitajn ĉarojn.

Ĉe aliaj gravaj industribranĉoj estas similaj solvendaĵoj, sed ĝenerale la tuta industrio devas solvi nur unu problemon. Ĝi estas jena: Kiel vendi varojn valorantajn 231 miliardojn da dolaroj al homoj, kies tuta jara enspezo estas nur 164 miliardoj. Aŭ se tio ne estus solvebla, kiel vendi la diferencon al eksterlando, sufiĉe profitante.

Krom ĉi tiuj kaj aliaj problemoj solvendaj por povi certigi la vivdaŭron, eĉ laŭeble la eternigon de l' hodiaŭa ekonomia, socia kaj politika ordo — kiu ja estas laŭ ĉies scio la plej bona ordo iam imagebla de homa cerbo — ekzistas kelkaj individuaj solvendaĵoj. Ekzemple:

Mussolini: Kiel ricevi sufiĉe da mono de miaj kreditantoj, por ke mi kapablu etendi la novan roman imperion sur ilian teritorion?

Baldwin: Kiom da venkaj militoj similaj al la lasta necesas por tute bankrotigi Brition?

Stalin: Se la kreo de 20 milionoj da novaj et-bienoj ne sufiĉis por akiri la apogon de l' burĝaj nacioj, kiom da privatposedaĵoj ni devas krei ankoraŭ, por ricevi sufiĉan prunton de la suprecititaj burĝaj nacioj, por finsukcesigi la komunismon?

Coolidge: Kiel mi povus ludi la rolon de modesta violo per tamburo sur la tegmento.

Ceteraj problemoj ne estas.

Verkis: *Adamo Karbministo*, New-York.

EL LA VIRINA VIVO

Paranĝa[1])

Jen mallarĝa strateto de uzbeka vilaĝo. Unuflanke altiĝas flava argila muro, aliflanke, ĝenata per mallarĝaj abruptaj bordoj, flubruas malbrila akvo en kanalo. Suno batas per netolerebla varmego, de muro sur sekiĝintan teron falis mallonga violkolora ombro. Laŭlonge de muro moviĝas stranga figuro. Senvizaĝa. Senmana. Ĝi estas volvekovrita de verto ĝis nudaj kalkanoj en vestaĵon, kiu similas mortveston de mezepokaj lepruloj, for de kiuj kuris ĉiu preterpasanto.

Kaj ĉi-malbonsigna figuro mem forvojiĝas kiam ĝi ekvidas viron.

Ne konfuzigu malpia aspekto de l' virino koron de ortodoksulo!

Leĝoj de lando de sablaroj kaj multkoloraj ĥalatoj[2]) estas antikvaj, severaj kaj senindulgaj. Puno estas rapida kaj sanga — kolo tratranĉita de akrigita kurba ponardo. Eniru kiel gasto al uzbeko. Li renkontas vin afable kaj gasteme — estu benita ĉiu gasto! Li sidigas vin sur tapiŝon, li proponas al vi en plata taso verdan teon. Sed ankoraŭ nun ne ĉiu uzbeko, eĉ kom.-partiano, vin enkondukos al virina parto de l' domo kaj prezentos sian edzinon.

Kaj tamen... Kaj tamen paranĝo mortas.

Jam 90 000 uzbekinoj formetis paranĝon!

Ili formetadis ĝin publike, malkaŝeme sur placoj de Samarkand, Kokand, Andijan.

Tiun-ĉi simbolon de centjaroj de virina senrajteco kaj sklaveco ili bruligis sur brullignaroj.

Virino de Uzbekio — energia, kuraĝa — batalas por sia liberiĝo.

Suferiga vojo! Vere sangoplena ... Ili konscie iras por malhonoro, ĉar estas senhonta ti-kiu malkovris vizaĝon sian kaj videbligis ĝin por vira okulo. Ŝin malbenos la patro, forpelos la edzo, lasos parencoj. Ŝin oni povas perforti, el post angulo mortigi, eniginte ponardon inter skapolojn — kaj la vilaĝo aprobos mortigulon, kaj maljunuloj en teotrinkejo, karesante siajn grizajn barbojn, eldiros: "Por hundo — hundeca morto..."

Nur en jaro 1927 la registaro de Uzbekio eldonis dekreton pri specialaj rajtoj por uzbekinoj kiuj petas helpon en juĝejo. Iliaj juĝaferoj estas solvataj ekstervice, kiel t. n. montr-procesoj. Al familioj de virinoj, pereintaj en batalo pro liberiĝo, estas elpagataj specialaj pensioj.

Orienta virino laboras en sovetoj, kooperativoj, diversaj sociaj organizoj. Ŝi aliĝas.

Jen kelkaj ciferoj: En j. 1925/26 en Uzbekio, Turkmenio k. a. orientaj res-

[1]) Vizaĝkovrilo en uzbeka lingvo.

[2]) Longaj manteloj portataj de multaj orientaj popoloj.

publikoj — entute 19 — oni kalkulis 29 842 virinojn — soci-laborantinojn. En j. 1926/27 ties kvanto pligrandiĝis preskaŭ duoble: — 48 057. Kom.-partio de 12 orientaj respublikoj kaj regionoj havis en j. 1922 nur 234 virinojn, sed ĉi-jare 2160.

Tiel la virino de Soveta Oriento traboras sian vojon malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj.

Trad. *S. B-v.*



TAGO EL MIA VIVO

Kun ĝojo mi legis la unuajn artikolojn, kiuj aperis en "S-ulo" sub la titolo "Tago el mia vivo". Tiuj ĉi artikoloj donis iom da vigleco al nia gazeto. Sed mi devas konstati kun bedaŭro, ke lastatempe la artikoloj fariĝas tro monotonaj. Unu similas la alian, kvazaŭ unu estus kopio de la alia.

Mi estas scivola kiel pasigas K-doj la liberan tempon, kiam ili ne plu sentas la jugon de materiaj zorgoj.

Mi klopodos mem pentri la bildon de mia libertempo, priskribi la bildon de mia dimanĉa tago.

Mi estas komizo, 24jara. Mi laboras sabate ĝis la 19—19½ horo. Poste mi rapidas hejmen alivestiĝi. Mia vagonaro, kiun mi estas prenonta, foiras je la 20 h. Mi do havas nur duonan horon por veturi hejmen, alivestiĝi kaj atingi la vagonaron. Kun la antaŭe preparita dorsosako mi forlasas la hejmon kaj feliĉe atingas la vagonaron. Mia destin-loko estas Ĉ. 18 km. de Budapesto. Mi alvenas tien post 50 minutoj.

Tie ni havas komunan tendon. K-doj, kies laboro finiĝis tagmeze jam estas ĉi tie kaj preparis ĉion, eĉ la kuŝejon por mi. Ili ĝoje min salutas. Kun mi alvenis



ankaŭ aliaj K-doj, kiuj ankaŭ apartenas al la Laborista Sporta Asocio. Demetinte la vestojn ni iras bani en la ondojn de Danubo. — Estas jam noktomezo, kiam ni kuŝiĝas. Post 4—5 hora dormado ni leviĝas. Kaj ĉe la matenkrepusko ni denove estas en la akvo. Ni ĝoje salutas la leviĝantan sunon. Ni admiras la belecon de l' naturo. Ni mem banas nude, senveste, ĉar la K-dinoj ne ankoraŭ ellitiĝis. Iom poste ni metas ban-pantalonetojn. Ni gimnastikas kaj matenmanĝas.

Notinde estas, ke la plejmulto el ni estas aŭ vegetaranoj aŭ t. n. krudaĵmanĝuloj[1]). Multaj el ni estas kontraŭalkoholuloj.

Tagmeze alvenas ankoraŭ granda nombro de Gek-doj el la urbo. Ni pasigas la posttagmezon amuzante nin per diversaj ludoj. La manpilkludo anstataŭas la piedpilkludadon; la lasta estas tro sovaĝa kaj pro tio ni preferas la unuan. Ni ankoraŭ banas unufoje ĉu en la refreŝigaj ondoj ĉu en la sun-radioj. Ni kantas diversajn laboristajn kantojn.

Per simila senzorga pasigo de l' tago refortiĝas niaj muskoloj kaj ĝenerale nia korpo. Per la flegado de la korpo, per ĝenerala klopodo al la korpkulturo ni volas labori ne nur mense por la homa kulturo. Ni kontraŭstaras la eklezion, kiu ĉiam batalis kontraŭ la nuda korpo. Ni klopodas klaskonscie eduki harmonie belan kaj fortan korpon, ĉar — en sana korpo — sana animo.

Budapesto, 3. 8. 27.

(343.)

[1]) Ili manĝas ne kuiritajn legomojn kaj fruktojn.

Ĉu vi jam renovigis vian membrecon al SAT?

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo sepa)

La komplemento (kontraŭo) de tiu grandega magia potenco estis, ke la reĝoj devis rigore obei iajn regulojn. Ili, ekzemple, ne povis manĝi aŭ trinki kion ajn. Laŭ Moret kaj Davy, tiuj *tabu*-oj (malpermesoj) devenas de la treege antikvaj kutimoj, tiaj, kiaj estis la malpermeso manĝi la totemon.

La faraonoj estis respondecaj pri ĉio, pri la malbonaj rikoltoj, pri la epidemioj, unuvorte pri ĉiuj malfeliĉegoj. Kiam okazis, ke reĝo estis ĉu malsana, ĉu tro maljuna por povi malhelpi tiujn malfeliĉegojn, la popolo postulis, ke li estu mortigata: "Tuj kiam aperas ĉe reĝo simptomoj de maljuneco, aŭ ĉe antaŭdifinita dato, post dek du, dudek aŭ tridek jaroj da regado, oni mortigas la reĝon dum granda ceremonio kaj oni anstataŭas lin per juna heredanto. Plej ofte, la reĝoj sukcesis mildigi tiujn kutimojn, delegante kiel anstataŭantojn homajn aŭ bestajn oferatojn; sed tiuj anstataŭoj estis tolerataj nur se ili donis al la maljuniĝintaj reĝoj renoviĝon de juneco kaj saneco[15])."

[15]) *Moret* kaj *Davy*.

Cetere, post lia morto la rolo de reĝo ne estas finita; ĝi eble estas eĉ pli grava. La reĝo, kiu estas dio, ne povas ja vere morti. Lia surtera morto estas nur la komenco de supernatura vivo. Li restas la protektanto de la mortintaj homoj, kiel li estis surtere la protektanto de la vivantoj. Tio klarigas kial fervorege kaj penege la egiptoj konstruis por la mortintaj faraonoj grandegajn kaj belegajn tombojn. La kolosaj piramidoj estas ja nur tombaj fortikaĵoj, kiuj defendas la kadavron de la dio-reĝo.

Ĉe la antikvaj egiptoj la kulto al kadavroj de reĝoj havis realan signifon; ĝi tute kongruis (konvenis) kun la tiutempa kredo. Nuntempe oni ankoraŭ konstatas similan kulton al kadavroj, sed ĝi estas nur formortinta restaĵo de iam vivanta ideo. Por kompreni kial "materialisme" pensantaj homoj povas ankoraŭ nuntempe honori putrantan karnon kaj ĝin zorge konservi en maŭzoleoj, necesas scii, ke tiu kutimo havis en la antikveco ian logikan signifon. Ĉi-okaze ni rimarkigu, kiom longe vivas ideoj, kiom forte ili influas la agojn de la homoj. En nia epoko, kiun karakterizas la scienco, la tekniko, fruktoj de la *Racio*, oni tamen konstatas, ke la mistiko, la religio ankoraŭ forte influas eĉ "liberpensantajn" homojn.

La leganto ne konkludo el tiu mia rimarko, ke mi kredas je la ekzisto de ideoj kun propra vivo, havantaj vere faktan vivon. Mi bone scias, ke la unuiĝo de la tuta Egiptio sub la regadon de unu sola reĝo-dio povis okazi nur tial ke la ekonomiaj kondiĉoj postulis tion. La vivo en la Nila valo estis ebla nur per discipline organizita socio. La loĝantoj de la Delto ne povus vivi, se okaze de sekeco la loĝantoj de la Alta Egiptio retenus la akvojn de la riverego; same okazus, se la riveraltiĝo superakvigus la Delton. Necesis konstrui kaj prizorgadi kanalojn, digojn, akvujojn. Kaj tio estis ebla nur per unueca regado. Necesis ankaŭ defendi la riĉaĵojn de la lando kontraŭ la oftaj atakoj de la nomadoj el la dezerto. Ni do konstatas, ke la ekonomio estis la ĉefkaŭzo en la estiĝo de la sociaj fenomenoj. Sed samtempe la kredoj, la ideoj ludis ankaŭ grandan rolon. La homo ja estas partoprenanto en la ekonomio; kaj la homo estas animalo havanta ideojn. Laŭ tio ĉu tiuj ideoj estas mistikaj, religiaj aŭ raciaj, la nepra malvolviĝo de la sociaj fenomenoj okazas pli aŭ malpli rapide kaj glate. Estas

ANATOL FRANS PRI LA MILITO

Malamu la militon!

"Virinoj, vi kiuj estas pli kuraĝaj ol la viroj, savu la homaron! Ĝi koncernas vin, ataki la monstron, kiu ĝin formanĝas; ĝi koncernas vin, batali kontraŭ la milito; bataleĝi senkompate. Do, de nun, antaŭen, malamu la militon per nekvietigebla malamo. Malamu ĝin, konsiderante ĝiajn krimojn, malamu ĝin vidante en la ornamaĵoj de la triumfo, kun la palmobranĉoj de la venko. Via malamo estu mortiga al ĝi; mortigu ĝin.

Ne diru, ke tio estas neebla kaj ke ĝi daŭros tiom longe, kiom la homa gento, ĉar la nacioj ĉiam estos malamikaj. Ili ja estas tiaj, kiam ili ekzistas. Sed la nacioj ne ĉiam daŭros. Ho virinoj! ho patrinoj! Niaj genepoj vidos Eŭropajn Unuigitajn Ŝtatojn, ili vidos Tutmondan Respublikon.

Virinoj bonkoraj, incitite per tiuj sentoj, iru tra la mondo kaj vi savos Eŭropon kaj estigos la feliĉon sur la tero!"

ANATOLE FRANCE (Anatol Frans). Tradukis SAT-ano 3489.

Ŝatu la militon

"La glavo ĉiam donis la superregadon al la pli bonaj. Oni bedaŭras, ke la armeo estas perforto kaj nur perforto. Sed oni ne pripensas, ke tiu perforto anstataŭis malordon, kaj fine, ke ĉie, kie ne ekzistas armeo, la mortigoj estas hejmaj kaj ĉiutagaj. La soldato estas necesa, kaj la milito estas, inter ĉiuj sociaj fatalaĵoj, la plej konstanta kaj la plej nekontraŭstarebla.

Mi kuraĝos diri, ke la milito estas humana, en tiu senco, ke ĝi estas la proprieco de l' homaro. Ĝi reprezentas la solan interkonsent-eblecon inter ties brutaj instinktoj kaj ties idealo pri justeco. Ĝi reguligas la perforton kaj tiel konsistigas la plej grandan rezultaĵon, kiun la homa speco ĝis nun atingis por mildigi la morojn. Ĉu oni faros pli bone en la estonteco? Ĉu oni forigos la perforton, kiun oni nur reguligis? Ĉu oni ĉesos militi, kaj ĉu la soldato iam malaperos? Estas fiimere esperi tian rezulton kaj danĝere labori por ĝin atingi.

La homo estas subigita al la fatalaĵoj de sia origino. Li laŭnature emas al perforto. Kiam li estos pacema, li ne plu estos homo, sed io nekonata, pri kio ni eĉ ne havas antaŭsenton. Ĉu mi konfesos tion? Ju pli mi pripensas, des malpli mi kuraĝas deziri la malaperon de la milito. Mi timus, ke malaperante, tiu granda kaj terura potenco kunportus kun si la virtojn, kiujn ĝi naskigis kaj sur kiuj nia socia konstruo hodiaŭ staras. Forigu la militajn virtojn, kaj la tuta civila socio forfalos. Sed eĉ se tiu socio povus restariĝi sur novaj bazoj, la ekzisto de universala paco ne kompensus la maleston de la sentoj el kuraĝo, honoro kaj ofero, kiujn la milito konservadas en la koroj de l' homoj. Ĝi naskas kaj luladas la heroojn en siaj sangaj brakoj. Kaj estas tiu funkcio, kiu igas ĝin plej nobla kaj sankta!"

ANATOLE FRANCE (La Vivo en Parizo, en la jurnalo "La Tempo", 18. julio 1886). Tradukis Eŭtrapel.

---

ja tute logike, ke ideoj vivantaj per la cerbo de homo influu la historian procezon.

La Egipta Imperialismo

La faraonoj sukcesis trudi sian regadon ne nur al tuta Egiptio, sed ankaŭ al najbaraj popoloj. Plivigliĝis la socia kaj politika vivo de la egiptia popolo. Naskiĝis rimarkinda literaturo populara kaj filozofia; kreiĝis grandioza arto, kiu vekas ankoraŭ admiron ĉe nuntempuloj.

Rilate fremdulojn, la egipto konsciis pri sia socia, politika kaj intelekta supereco. La fiereco esti regato de potenca faraono vekis ĉe li koncepton pri egiptia patrio.

Kaj, kiel logike devis okazi, la faraonoj estis devigataj fari imperialisman politikon. La popolo ja bezonis krudaĵojn el eksterlando; ĝi bezonis eksporti naturaĵojn de la kampoj kaj produktojn el la laborejoj sur la fremdajn bazarojn. La lando tendencis fariĝi iu "plej granda Egiptio". Militaj ekspedicioj (militiroj) plioftiĝis. Invadintoj estis forpelitaj, barbaroj venkitaj. Palestino kaj Sirio estis konkiritaj; egiptia imperio en Azio fondita. Dum tuta jarcento (1460—1360) la egiptia superregado sin trudis preskaŭ sen milita enmiksiĝo.

Tiu imperialismo estis ja ekonomia neceso. Ĝi provis sin trudi ne nur per armiloj, sed ankaŭ per diplomatiaj rimedoj. La faraono ne ĉiam kaj ĉie trudis sian personan regadon. Li kontentiĝis per la vasaleco de la venkitaj reĝoj, kiuj pagis al li tributojn. La nuntempaj regmanieroj kiel la *protektorato* estis jam aplikataj. La egiptia kulturo sin trudis per tute similaj rimedoj, kiel tiuj uzataj hodiaŭ de la Grandaj Potencoj. La egiptia administrado lasis ian sendependecon al la "protektataj" popoloj; la kutimoj kaj moroj de ĉiu urbo estis respektataj; same ankaŭ la diversaj religiaj kultoj. Tio estas historie pruvita. En la jaro 1887 a. K. oni ja eltrovis en la ruinoj de la antikva ĉefurbo *Ikhutatono* (nuntempe *Tell el-Amarna*) proksimume 300 brikojn, gravuritajn laŭ konforma skribo kaj kiuj konsistigis la arkivajn dokumentojn de la departemento por eksteraj aferoj de la tiutempe reganta faraono, Amenofis la IV-a (1380—1362 a. K.). Por la unua fojo en la historio de l' mondo aperis skribaj dokumentoj, kiuj rakontas per klara maniero pri eksterlanda politiko de la antikva Egiptio.

(Pluo sekvos) *E. Lanty.*

Daŭrigu la varbadon por Sennaciulo!

MILIONULOJ

Legante tiun ĉi vorton oni kredas sin en la inflacia epoko. Jes, siatempe SAT eĉ estis multfoja bilionulo, sed en sekvanta artikolo ne temas pri la inflacia epoko, tute ne! Tiuj mil — ion — uloj ekzistas nuntempe kaj ne nur en Germanio. Ĉiu lando kapitalista ja havas tiajn ulojn en pli malpli granda kvanto. Bona signo, ke tiuj vampiroj tre bone kaj sagace komprenis la ekspluatadon de siaj kunhomoj. Unuflanke milionuloj kaj aliflanke — malriĉuloj senlaboruloj. Jen la plej drasta bildo de la kapitalista sociordo. Ni paroligu la faktojn.

La Statistika Regnoficejo de Germanio publikigas tre interesan statistikon rilate la loĝlokojn de la milionuloj en la germana "respubliko". La plej multaj milionuloj troviĝas en la ĉefurbo Berlin, tiam sekvas laŭvice la aliaj urboj. Ni citu kelkajn:

Urbo	Milionuloj
Berlin	525
Hamburg	155
Leipzig	98
Frankfurt	88
München	79
Köln	75

ktp.

Kompreneble ni ne lasu trompi nin. Ni scias, ke en ĉiu urbo ekzistas pli da tiaj "malriĉuloj", kiujn la Statistika Oficejo ne povas registri, ĉar tiuj uloj tute ne fanfaronas, sed ŝatas resti kaŝaj milionuloj. La kaŭzon ni tre bone scias. Post la fanfarono tre rapide marŝas la fisko kaj pagi impostojn estas la plej malŝatata okupo de tiuj "malriĉaj" milionuloj. Pro tio laiko tute ne povas imagi kiom da impostoj kaŝe retenas tiuj vampiroj. Iu laboristo, laboranta en fabriko aŭ ĉe iu entreprenisto, ne havas la eblecon trompi la ŝtaton, ĉar ĉiu pfenigo da impostoj jam estas dekalkulata en la kontoro ĉe la elpago de la salajro.

Tre interesa estas la demando ĉe tiuj statistikaj konsideroj: Kiom da impostoj pagas tiuj milionuloj? Ankaŭ tiurilate la statistika oficejo donas informon. Ekzemple la kapitalo, kiun posedas tiuj 98 milionuloj en Leipzig, estas impostata kun $1\frac{1}{2}$ miliardoj da markoj. Tiu fakto montras al ni, kiom da mono troviĝas en la poŝoj de kelkaj vampiroj. En Leipzig ni povas konstati, sur unu flanko 98 milionulojn, kaj sur alia flanko iom pli ol 500 000 laboristoj. Meznombre 5000 laboristoj devas laboregi por ĉiu el tiuj vampiroj, por ebligi al ili bonstaton kaj luksan vivon.

Kvinmil kontraŭ unu!

K-doj, tiu ĉi kontrasto ne povas daŭre restadi. Venos la tempo, kiam la proletoj marŝos en unu vico kaj rompos la barojn por finfine disŝiri tiun de "dio dezirata" sociordo.

Rolo.

☆ DISKUTEJO ☆

La Socialismo depost la Milito

Sangoplena fosaĵo disigas la novan socialistan generacion de la maljunaj agitantoj antaŭmilitaj. La milito detruis la unuecon de la Laboristaro: socialistoj kaj komunistoj interbatalas anstataŭ unuiĝi. Ĉiuj apelacias al Marks, sed la komunistoj asertas, ke ili, solaj, restas fidelaj al la unuatempa marksismo de la 1847-a jaro: "la historio estas nur longdaŭra klasbatalo; inter proletoj kaj kapitalistoj la konfliktoj pliakriĝas laŭmezure kiel plifortiĝas la kapitalisma kuncentriĝo; la proleta klaso, kies mizero senĉese pliiĝas, fine ekrevolucios, kaj preparos, per diktatoreca periodo, la estriĝon de la Proletaro"; jen estas la esenco de la dogmo. Ĉiu, kiu ne restis severe fidela al tiaj principoj, perfidis.

La konvinkiĝo kaj la atakoj de la komunistoj ŝajnas procedi de duobla eraro. En lando tiom aliigita, kiel estas Eŭropo de 75 jaroj, estas paradokse reveni al la tekstoj de la 1848-a jaro. La ekvolviĝo de Usono, la ekonomia valoriĝo de la mondo, la kuncentriĝo de la trustoj ŝanĝis la aspekton de la kapitalisma mondo. "La Marksismo devas evolui aŭ ĝi bankrotos". Cetere la reviziismo datumiĝas nek de Bernstein, nek de Jaurès, sed de Marks mem, kiu kapablis adaptiĝi al la realeco. La koncepto de Marks ne estas tute kompleta en la Manifesto, oni devas ĝin kompreni en ĝia tuto; ĝi tiam aspektas treege malpli simpla kaj malpli bruta.

Ni do ekzamenu kiaj estis kaj kio fariĝis la grandaj tezoj:

1. Ke la ago de la ekonomiaj faktoroj estu pliinflua en la historia evoluado, tio estas evidenta. La principo pri la *historia materialismo* fariĝis ĝeneralaĵo, ĝi apartenas al la "intelekta hereda posedaĵo" de la homaro. Sed ĝi ne implikas, por ke oni devu plene preterlasi aliajn faktorojn moralajn aŭ politikajn. La vekiĝo de la ĉina naciismo, la hinda poraŭtonomia movado, eble klariĝas per ekonomiaj konfliktoj, sed oni neniel konscias pri ili, kaj tiuj mem, kiuj impulsas, lokas siajn depostulojn sur alia kampo. La sociaj bataloj estas *antaŭ ĉio,* sed ne ĉiam ekskluzive, klasbataloj.

2. Kiel prezentiĝas tiaj klasbataloj? Ĉu oni devas vidi en ili nur simpligitan konflikton inter du homaj grupoj: la kapitalistoj kaj la Proletaro? Je fino de la tria volumo de la Kapitalo, Marks mem konstatas, ke, en la nuna socistato, estas tri klasoj kaj ne du: la salajratoj, la kapitalistoj kaj la bienuloj. Li eĉ analizas la agadon de la klasoj interaj, nome de la kamparanoj-posedantoj.

Koncerne la laborularon, ĝi komprenas la intelektulojn, kiel la manlaborulojn. La spirita laboro samvaloras la alian, kaj Marks malatentas nek la observistojn, nek la direktistojn de la industrio.

La kapitalista kuncentriĝo mem ne efektiviĝas laŭ skema reguleco. La fakto praviĝas koncerne la industrion. Sed koncerne la komercon, la kuncentriĝo estas nekompleta; la "butikoj je multnombraj filioj" prezentas tipon pri kuncentriĝo tre diferenca de tiu de la grandaj industriaj trustoj. Koncerne la terkulturadon, ĝia kuncentriĝo estas ankoraŭ multe malpli certa: la dramo de ĉi lastaj jaroj estas la pecigo de la granda agrara posedaĵo en Sovetio kaj en la tuta orienta Eŭropo. Ni estas malproksime de la fama antitezo de Marks: nombro malkreskanta da kapitalistaj magnatoj, baldaŭ tute senpropraĵigotaj de nombro kreskantaj da proletoj.

Ĉu tiu Proletaro iras tiel senŝancelige, kiel estas dirite, al sia emancipiĝo? La mezaj klasoj, la laboristoj produktantaj la superaĵon pliproksimiĝas al la kapitalismo, dank' al kiu ili vivas. La batalo fariĝas treege pli malfacila: "ne temas kontraŭbatali kelkajn individuojn, sed klason, kiu kalkulas sur frakcion de la Proletaro en la batalo kontraŭ la proletoj!"

3. La leĝo pri la kreskanta mizero ankaŭ ne povus esti kontrolata kun matematika akurateco. Sendube, depost la milito, la krizoj de senlaboreco en Anglio, en Polio, en Germanio ŝajnas venigi al kreskanta proletariĝo. Sed fortoj agas kontraŭdirekte, la okhora labordaŭro, se ĝi estis venko laŭ principoj, ankaŭ venigis materiajn plibonigojn: "la politika kaj socia penado de la laboristoj celas kompensi la agadon de la kapitalismo".

4. Tiel, la batalo por la aliiĝo de la nuna reĝimo restas akra, necerta en sia irado, estas necese, ĉiupaŝe, rompi kontraŭstarojn, kolizii kun interesoj bone aŭ malbone komprenataj, vidi tiujn, por kiuj oni batalas, sin turni kontraŭ tiuj, kiuj batalas.

Ĉu plibonigoj povas sufiĉi por forigi tiajn malhelpojn? Marks forte kondamnis la *Blankistan* ribelon (tio estas la ribelo laŭ *Blanc*[1]), li antaŭvidis la reformismon preparanta la revolucion. Ĉu longdaŭraj elvolviĝadoj kaj revoluciemaj krizoj ne devas alterni? Se ne, ĉu oni ne riskas vidi, ĉiumomente, la monajn potencojn modifi kaj ruinigi la decidojn de la ĝenerala voĉdonrajto?

Se la Revolucio, "akuŝigisto de la nova Socio", devas okazi por kompletigi niajn penojn, se la diktatoreco de la Proletaro, konceptata kiel la diktatoreco de la *plimulto* venkinta kontraŭ la atakoj de la burĝa klaso, devas iam fariĝi nepra, nia rolo konsistas en dediĉo al la ĉiutaga agado niajn fortojn, nian spiriton, nian koron, por baldaŭigi tian progreson malkontinuan, sed realan, al kiu ni kredas.

E. Lamare.

Kun afabla permeso de la redakcio tradukis el "L' Eveil Universitaire" (La Universitata Vekiĝo), ĵurnalo de la socialistaj gestudentoj el Belgio.

M S. (1784).

Adreso de la organizo:

K-do Jean Allard, 5, rue Vapart, Angleur (Belgio).

La socialistaj gestudentoj el ĉiuj landoj estas petataj sendi salutojn al ĉi organizo por disvastigi nian movadon en ĝi. Kelkaj *mitrati* blufas en ĝi.

La tradukinto.

[1]) Ĉu ne Blanqui (Blanki)? — *Red.*

Ĵus aperis:

E. IZGUR

NUR VOLU!

La festo de laboro kaj paco
Unuamaja kanto de ribelo

Eldono dua, reviziita kaj ilustrita

Prezo: 0,70 mk. g.

Mendu ĉe Administracio de SAT

Rich. Lerchner, Leipzig O 27
Colmstr. 1 (Germ.)

Por nia Distro

Hejmaĵo

Binks al sia amema edzino dum la matenmanĝado:

— Ĉu vi scias, amatino, ke hodiaŭ estas la dudek-kvina datreveno de nia geedziĝo? Mi tuj buĉos kokidon pro tiu okazo.

— Ho! aŭskultu, karulo, respondis riproĉtone sinjorino Binks, kial puni bedaŭrindan besteton pro tio, kio okazis antaŭ dudek-kvin jaroj!

* * *

Por trankviligi la gemaljunulojn

— Iu bona maljunulino, tremante je penso pri la infero, konsultas sian konfesprenanton, kiu al ŝi malfermigas la buŝon, tute sendentan...

...Iru en paco, mia bonulino, vi neniel bezonas timi. Estas dirite en la Evangelio, ke la infero estas loko, kie oni grincigas la dentojn! Vi estas imunigita, ĉar vi ne plu havas ilin...

* * *

Priscienca diskutado

Du negroj diskutas pri la teorio de Darwin koncerne la evoluon.

— Darwin estis prava, diras la unua; kiam mi cin rigardas, mi bone vidas, ke ci devenas de la simio.

— Ankaŭ mi kredas al tia evoluo, respondas la alia, ĉar, kiam mi cin rigardas, mi vidas, ke ci ne ankoraŭ evoluis!

Kompiltradukis *1784.*

TRA ESPERANTIO

INTERLANDA ESPERANTO-KORESPONDADO KIEL EDUKILO AL SENNACIISMO

La nuna periodo de l'esperantista vivo kaj movado bazas sin sur la esp-a literaturo kaj interlanda esp-a korespondado, ĉar la nunaj cirkonstancoj ne estas favoraj por renkontiĝo kaj persona interamikiĝo de diverslandaj esperantistoj; do esperanta laborista libraro kaj korespondado estas tiu ligilo, kiu kunligas la ruĝan esperantistaron. Tial nenio mirinda estas en la fakto de ĉiujara kresko de internacia korespondado peresperanta. La graveco de ĉi fako en nia movado devigas nin, SAT-anojn, tre serioze studadi ĉion rilatantan al la interlanda korespondado por organizi tiun ĉi emon de l' proleta esperantistaro al korespondado kun eksterlandanoj. Ni devas ne nur preni ĝin sub nian gvidadon, sed konscie per rektaj, taŭgaj rimedoj direkt-konduki tiun ĉi brue traboriĝantan torenton de korespondaĵoj, ofte senordan, en sennaciecan fluejon, konformigi ĝin kun la celoj de nia SAT-movado[1]).

Kiel naskiĝas ordinare interlanda korespondado?

Ĉiu nova ano de esperanta movado, ofte eĉ nur "amiko de esperanto", apenaŭ ellerninte abocon de la lingvo sendas sian leteron eksterlanden por konvinkiĝi, ĉu li efektive estos komprenata en "la tuta mondo". Ĉu la instruistoj kaj kursgvidantoj malhelpas al tio? Male: plejparte ili aprobas tion, por pliigi la intereson de sia lernanto al studado de la lingvo aŭ por kolekti kiom eble plej multe da ekspoziciaĵoj por propaganda ekspozicio. Tia estas la unua paŝo en korespondado, kiun ni tamen ne povas refuti.

La dua estas — organizado de "ĉeletoj" por interkorespondado en kluboj, lernejoj, fabrikoj, kun la celo interligiĝi kun eksterlandaj K-doj. La korespondado fariĝas pli serioza, sed tiuj ĉi grupoj tre ofte korespondadas pere de esperantisto-tradukisto kaj ofte ne trovas tempon por mem ellerni esperanton. Pro tio la korespondado ne estas longedaŭra.

La tria granda kategorio de korespondado estas tiu de infanoj en lernejoj, por kiuj la korespondado havas pli amuzan ol seriozan karakteron. Ĝia celo estas ellerno de la lingvo, tuja ĝia apliko, kolekto kaj interŝanĝo de objektoj interesaj por infanoj.

Restas ankoraŭ grupo da lertaj esperantistoj, kiuj korespondadas kun serioza celo; inter ili ni povas trovi tiujn, kiuj en sia korespondado estas veraj sennaciuloj, havantaj ĉiam antaŭ siaj okuloj klaran idealon de SAT-movado. Ili per sia korespondado propagandas la ideojn de sennaciismo kaj ofte kreas novajn adeptojn (sennaciulojn) el siaj korespondantoj[2]).

Ĉe la unua rigardo ŝajnas, ke nur la lasta kategorio de korespondantoj estas utila por la SAT-movado, tamen tiu konkludo ne estus tute vera. Ni pripensu, ke multaj el tiuj K-doj fariĝis "bonaj" korespondantoj-sennaciuloj trapasinte antaŭe la unuajn grupojn de korespondemuloj; ili, por tiel diri, "eloviĝis" el tiuj embriaj kategorioj. Do, ni ne malŝatu, sed atenteme prizorgu tiujn unuajn ŝtupojn al la supera speco de interlanda korespondado, ni transformigu ilin laŭ niaj celoj, ni kulturigu bone tiujn florbedojn, sur kiuj devas elkreski belaj floroj de vera sennacieca kulturo, ĉar estas nenia dubo, ke en nia epoko de disigita homaro la interlanda esperanta korespondado estas la plej efika rimedo por unuigi diverslingvan Proletaron en unu potencan, fortike cementitan kaj unuece kulturitan en sennacieca idearo forton. Tial ĉu aranĝante infan-korespondadon, ĉu helpante al komencantoj, ĉu kolektante materialon por niaj ekspozicioj, — *ni ĉiam memoru* la finan celon de la laborista korespondado — *sennaciecan edukadon kaj edukiĝon.*

El kio do povas konsisti tiu eduk-edukiĝo?

Mi provos skizi la ĉefajn ideojn, kiuj povas utili por atingi tion:

1. *Kunfratiĝo de laboruloj diverspopolaj.* La ekonomiaj kaŭzoj postulas la unuiĝon de ĉiulandaj laboristoj: "Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu". Agante en tiu direkto ni devas nepre havi sukceson, ĉar ni, krom ĉiuj fortoj unuigantaj la Proletaron, havas ankoraŭ lingvon por ĝi komunan, per kiu ni povas plirapidigi la procedon de la unuiĝo.

2. *Disvastigo de esperanto.* Ni ne estu tro facilanimaj rilate al daŭro kaj kvalito de esperanto-kursoj. Ni klopodu, ke antaŭ ĉio niaj anoj kaj korespondantoj estu lertaj esperantistoj. Mallerta esperantisto ne taŭgas por serioza korespondado, li baldaŭ tedos al sia korespondanto. Ni instigu ellerni la lingvon, ĉar pro ĝia facileco ĉiu povas ekposedi ĝin. Ni gvidu la perfektigon en tiu rilato, ni amike korektu la erarojn kaj difektojn de stilo en leteroj, ĉar multajn nekorektaĵojn kaj "pezaĵojn" en la stilo povas rimarki plej facile nur eksterlandulo.

3. *Propagando de SAT.* Per korespondado oni ofte sukcesas disvastigi la ideojn de nia asocio, varbi novajn SAT-anojn, fortiri laboristojn el la neŭtrala esperanto-movado ktp. Sendado de SAT-eldonaĵoj, jurnaloj multe helpas por tio.

4. *Batalo kontraŭ mensogemo kaj ŝovinismo de burĝa gazetaro* per vera priskribo de la situacio, tendencoj kaj okazintaĵoj de laborista vivo. "Nia gazetaro skribas tion kaj tion pri la lasta okazintaĵo en via lando. Skribu al ni la veron pri tio." — Jen estas la peto tre konata al ĉiu korespondanto. Ĝi montras, ke esperanta korespondado povas solvi la demandojn (de la laboristoj) aliel ne solveblajn pro diverseco de priskriboj en diverspartia nacia gazetaro. Precipe tio rilatas al la vivo de Sovetlandoj pritraktataj de la vidpunktoj de burĝaj gazetistoj. El tio sekvas:

5. *Sovetlandaj korespondantoj* devas konatiĝi al siaj eksterlandaj Kamaradoj la laboristan vivon en Sovetio kaj precipe la solvon de l' naciproblemo en sovetaj respublikoj. Sur la vastega areo de Sovetio ne ekzistas ja "malamikaj" limoj, doganejoj kaj aliaj baroj por ĝiaj diversnaciaj civitanoj, apartenantaj al diversaj sovet-respublikoj.

Gvidata de ĉiuj ĉi ideoj, la interlanda korespondado nepre pli aktivigos ĉiun K-don, plilarĝigos liajn interesojn kaj subtenos ĉiam lian animstaton sur la alta nivelo de sennaciismo. (Finota.)

V. Vozdvijenskij (Odessa), SAT-ano 4024, instruisto de Muziklaborlernejo (Muztrudŝkola).

[1]) Racia grandskala organizado de la korespondado postulas bonan statistikon precizan kaj profunde karakterizantan la korespondantaron kaj la korespondaĵaron. Sed ni prokrastas la pritrakton de tiu ĉi speciala problemo ĉar ĝi eliras ekster la temon de ĉi artikolo.

[2]) K-do Akselrod en Odessa aligis al SAT 5 siajn korespondantojn-laboristojn, kiuj ĝis tiam nenion sciis pri sennaciismo.

Agu honeste!

Multaj Gek-doj plendas, ke laŭ iliaj anoncoj en korespondfako de "S-ulo" pri kolektiva korespondado, ili plejparte ne ricevas eĉ unu leteron. Laŭ mia opinio, tio estas kulpo de la kolektivgvidanto, kiu ricevinte jam ian leteron malrapide respondas aŭ eĉ entute forgesas pri sia devo. Ĉiu korespondemulo, proponinte unufoje al iu kolektivo la interkorespondadon kaj ne ricevinte respondon evitas poste ĝenerale la kolektiv-anoncojn. Mi kategorie proponas al la redakcio de "S-ulo" pridiskuti sur la paĝoj de nia gazeto jenon:

1. Ĉiu petanto pri korespondado okaze de lia nerespondo al iu korespondpropono pagas en la SAT-kaso punmonon: a) egala al SAT-kotizo, se li nur anoncis sian adreson; b) la duoblan sumon, se li ankaŭ garantiis aŭ certigis la respondon.

Por ni, proletoj, la interkorespondado ne estas ludilo, kaj ni ankaŭ ne havas superfluan monon por vana korespondado. *(6771.)*

Rim. Principe la propono de nia K-do estas tre subteninda. Bedaŭrinde en la praktiko ĝi estas malfacile efektivigebla. Longa enketo estus necesa por pruvi a) ke la letero sendita ne perdiĝis survoje, b) ke saman sorton ne havis la respondo, c) ke la korespond-petanto ricevis respondon pri la temo anoncita k. ne pri alia ktp. Almenaŭ ne estas malbone, ke oni alvoku pri honesteco k. seriozeco. — *E. L.*

✯ DIVERSAĴOJ ✯

Nova sendstacio disaŭdigas en esperanto

Regule ĉiun lundon je la 8,30 h. vespere (laŭ Kieva tempo) per ondlongo 775 m. Radio-Oficejo de Kieva Intersindikata Komitato disaŭdigas en kaj pri esperanto. La disaŭdigoj jam okazis la 10., 17., 24., 31. de oktobro kaj 14. de novembro. Idistoj penas propagandi inter Kieva radiistaro kaj trudi al ĝi sian dialekton. Tial tre gravas, ke ĉiu eksterlanda esperantisto aŭskultinta Kievan esperantan disaŭdigon sciigu pri tio al la radio-oficejo laŭ la adreso: Sovet-Unio, Kiev, str. de Korolenko, 33, "Dvorec Truda", kv. n-o 125, Radio-Bjuro OSPS. *728.*

*

Pri "Oktobra Revolucio"

La ĉi suba "gratulo" estas unu el la plej tipaj, kiujn ni ricevis okaze de la X-a datreveno de "Oktobra Revolucio". Pro manko de loko ni kompreneble ne povas publikigi ĉiujn. Dankon al ĉiuj sendintoj! — *Red.*

*

La Batuma "SAT"-ĉelo, ĉe la Centra Laborista Klubo, kaj la Militista Esperanto-Rondeto, ĉe la N-a Ruĝarmeana Klubo, kore gratulas sian revolucian gazeton "*Sennaciulo*" kaj la tutmondan "SAT"-anaron, okaze de la X-a datreveno de la Proletara Revolucio...

Ni esperas, ke dum la Nova Proletara Jaro, la Citadelo de l' Tutmonda Revolucio, Sovetio, ĉiam plu plifortiĝos kaj progresos, en ĉiuj rilatoj, konstruante la Novan Vivon

sur la ruinoj de l' malnova mondo, gvidos la Tudmondan Proletaron al la jam proksima Mondrevolucio, konstruante firman fundamenton por la estonta Sennacieca Socio, la Mondkomuno, en kiu ekzistos nek landlimoj nek lingvaj baroj.

A. Tanner,
ĝenerala sekretario
de la Batuma "SAT"-ĉelo.

*

Tutmonda Esperantista **Pedagogia Servo** por informadi la instruistajn gazetojn kaj Internacion de l' Instrulaboristoj kun aldono de esperanto-lingva resum-folio de *La Vojo de Klerigo,* monata pedagogia revuo. — Sekretario: M. Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio.

Ni rekomendas ĝin varme al ĉiuj edukistoj k. al ĉiuj, kiujn interesas tiu ĉi problemo.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Francio. En *Bourges* funkcias nun 3 kursoj kun 32 gelernantoj. Unu kurso estas gvidata de K-do, kiu baldaŭ SAT-aniĝos. La aliajn kursojn gvidas K-do 5820. — La FEO-Kongreso okazos tie ĉi la 8.—9. aprilo 1928. Alilandaj K-doj estas kamaradece invitataj k. estos bone akceptataj. — En *St. Pierre-des-Corps* malfermiĝis kurso kun 15 Gek-doj. Ĝi estas gvidata de K-do 8251 kun helpo de K-dino 9620. — La regiongrupo organizis paroladon en *Tours.* Ĉeestis 60 p. Oratoris K-do 518. Kurso estos baldaŭ malfermota k. laborista grupo starigota. — En *Vierzon,* kie ĝis nun ne estis esp-istoj, 8 K-doj lernas esp-on. Duonmonate K-do 5820 gvidas kurson. — **Germanio.** Vigla laboro estas en la LEA-grupo de *Hennigsdorf.* La 21. 9. 1927 komenciĝis nova kurso kun 8 partoprenantoj, gvidata de K-do Zabel. — Dum burĝa esp-okunveno en *Tegel* paroladis K-do Qualitz varbinte por la laborist-esp-ista movado. — En *Velten* (Mark) la sporta kartelo aranĝis la 2. 11. 1927 publikan kunvenon por esp-o. Paroladis K-do Qualitz. Tuj sin anoncis 17 lernontoj kaj fondiĝis esp-a rondeto. La laboristgazetoj "Rote Fahne" kaj "Volksblatt" enpresigas ĉiam niajn sciigojn. Dum granda festo de la komunista partio, la grupo aranĝis tre bonan ekspozicion. (5644.) — **Sovetio.** *Kievo.* Junkomunista ĉelo ĉe 3-a kaj 4-a ŝtatmuelejoj ricevis interŝanĝe standardon de Dresdenaj ruĝfrontbatalantoj. Kun la standardo la ĉelo partoprenis la manifestacion dum la oktobra festo. Kieva Intersindikata Komitato funkciigis esperanto-konsultejon. Radio-oficejo de la Intersindikata Komitato regule ĉiulunde disaŭdigas en kaj pri esperanto. — **Svedio.** Lasttempe la esp-a movado en *Göteborg* tre vigliĝis. 7 kursoj funkcias kun ĉirkaŭ 150 partoprenantoj. Tri kursoj estas aranĝitaj de la loka sekcio de ABF (Kleriga Ligo de Laboristoj). ABF pasintjare aranĝis 65 kursojn. Funkcias ankaŭ diskut-rondo kun 15 partoprenantoj, kiu uzas nur esp-on. (6313.)

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":
L'Ecole Emancipée, Paris, 6. 11. 27: Infaneco de Lenin. — *Volksstimme,* Chemnitz, 15. 10.„27: Leteroj de Sacco k. Vanzetti. — *Neue Zeitung,* München, 9. 11. 27: La tombo de la 18 000. — *Strahdneeku Awise,* Leepaja, 28. 10. 27: El Manĉurio. — *De Belgische Tram,* Bruxelles, 1. 6. 27: Vienaj tramistoj k. esp-o. — *L'Effort,* Lyon, 1. 10. 27: Petrolmilito, Polvo en aero, 15. 10. 27: Vivkondiĉoj de laboristoj en Sudafriko, El Aŭstralio, En Blank-Rusio. — *Le Drapeau Rouge,* Bruxelles, 13. 7. 27: Rasmilito en Transvaal, 11. 8. 27: Proleta ŝtato honoras esp-on. — *Sport k. Socialisme,* Bruxelles, 25. 4. 27: Antaŭenema Ĉinio. — *Jeunesse Ouvrière,* Bruxelles, 15. 4. 27: El Britio. — *Ojratskij Kraj,* Ulala, 22. 10. 27: Letero de esp-isto al junkomunistoj de Ulala.

Enhavis priesperantajn artikolojn aŭ notojn:
L'Avant-Garde, Tours, 17. 9. 27, 29. 10. 27. — *Munkáskultura,* Budapest, 10. 27. — *Mitteilungsblatt der Internationalen Transportarbeiter-Föderation,* Amsterdam, okt. 27. — *L'Emancipateur,* Bourges, 25.9.27 (publikigas rezolucion voĉdonitan de arondismenta-konsilantaro de Moulins, postulanta enkondukon de esp-o en la lernejojn), 2. 10. 27. — *L'Etincelle,* Bruxelles, 25. 5. 27. — *Le Drapeau Rouge,* Bruxelles, 28. 5. 27. — *Sport k. Socialisme,* Bruxelles, 9. 5. 27. — *Le Populaire,* Paris, 26. 9. 27, 30. 9. 27, 3. 10. 27, 10. 10. 27. — *Le Bellevilleois,* Paris, okt. 27.

Tradukis el esperantaj leteroj:
Atputai, Leepaja, 30. 10. 27.

Represis el "Sennacieca Revuo":
The New Leader, Friday, 4. 11. 27: La skulptisto de la revolucio: Jukov. — *The Labour Woman,* London, 1. 11. 27: La vivo de la holanda laboristino kaj laboristedzino.

Enhavis notojn pri SAT:
The Daily Herald, London, 4. 11. 27: — *Latfil,* Libaŭ, n-o 9. — *Argentina Esperantisto,* en n-o 16 de sia propaganda eldono. — *ISK,* Schlüchtern, nov. 27.

Enhavis enesperantajn artikolojn:
Wochenbericht, Moskva, 23. 9. 27.

Ni ricevis krom tio multajn gazetojn, kiuj represis div. artikolojn el GAZETSERVO. Ĉar la gvidanto de la GAZETSERVO okupiĝas pri tiu speciala statistiko, ni ne notas la koncernajn gazetojn.

Ĉiu instruisto, ĉiu instruema esperantisto nepre abonu al

Formato: 15×22½ cm

Jaro V/IX. N-o 2 (50) Novembro 1927



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

EDUKADA SERIO

ENHAVO:

Redakcia Angulo. — *E. Lanty:* Sennacieca Asocio Tutmonda pri Edukado. — *E. Spiridoviĉ:* Pacifista Internaciismo aŭ revolucia sennaciismo. — *M. Van de Moortel:* La pedagogiaj taskoj de l' Eduklaborista Internacio. — *C. Freinet:* Por Sennacieca Infan-literaturo. — Inter ni. — Edukista Sekcio de SAT. — *C. Freinet:* Edukivaj Teknikoj de Sennacieca Lernejo. — *M. Boubou:* Fakkunsido de edukistoj.

Redakcio: 14, Avenue de Corbéra, Paris, XII-e (Francio)
Administracio: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

Postulu tuj provekzemplerojn ĉe la Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27. Abonu kaj abonigu ĉi tiun revuon!

ENHAVO:

Kvar milionoj da sklavoj en Afriko, trad. K. Straube . . . pĝ. 65
Sanga teroro de la kristana registaro de Nederlando kontraŭ la revoluciuloj en Malajaj insuloj „ 65
Petrolo — Reĝo de l' Mondo, trad. Kolektivano . . . . . „ 66
Jen, kion kaŭzas la varmego! de Adamo Karbministo . . . „ 67
El la virina vivo, trad. S. B-v. . „ 67
Tago el mia vivo, de 343 . . . „ 68
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, de E. Lanty . . „ 68
Anatol Frans pri la milito, trad. Eŭtrapel . . . . „ 69
Milionuloj, de Rolo . . . . . . „ 69
Diskutejo . . . . „ 70
Por nia Distro . . . . „ 70
Tra Esperantio, anonco . . . . „ 71—72

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)